

LA UNUA EKLEZIO Jean Field

En nur 28 ĉapitroj La Agoj de la Apostoloj priskribas la unuajn 30 jarojn de la kristana epoko. Dum tiuj gravaj jaroj la judoj kaj poste la nacioj aŭdis la evangelion el la buŝoj de la apostoloj mem. Ne povas esti pli pura fonto de scio pri la instruaĵo kaj organizo de la unua kristana eklezio.

Evidente Luko, kiu verkis tiun libron, skribis nur resumojn de la paroloj de la apostoloj; eĉ je la fino de la unua li skribis '... *per multaj aliaj paroloj li (Petro) atestis ... 2:40*). Sekvas, ke tio, kion li skribis konsistigas la esencon de la vera evangelio. Esploro de tiuj paroloj kaj de la organizado de la konvertitoj donos bildon de tiu eklezio, kun kiu oni povas kompari ĉiujn ekleziojn, kiuj nomas sin kristanaj.

La unua parolo estas tiu de Petro je la Pentekosta tago, kiu troviĝas en la 2-a ĉapitro. Eblas ĉerpi ses temojn el tiu parolo:-

- 1 JESUO estas viro de Dio, elmontrita per mirakloj, kiujn Dio faris per li
- 2 Li estis KRUCUMITA laŭ la difinita intenco kaj antaŭscio de Dio
- 3 Dio RELEVIS lin el la mortintoj
- 4 Dio faris lin Sinjoro kaj KRISTO por sidi sur la trono de David. 'Kristo' estas la greka vorto por la hebrea 'Mesio', kiu signifas 'sanktoleita'. Tio signifas, ke Jesuo estas reĝo kaj juĝisto, kaj tio signifas la REGNON de Dio
- 5 Ĉio tio plenumis la PROFETAĴOJN de la Malnova Testamento
- 6 Por ricevi pardonon de pekoj kaj esti savitaj, la homoj devas penti kaj BAPTIGI

Se ni komparas tiun parolon kun la sekvantaj paroloj de Petro kaj Paŭlo, ni povas konstati ĉu la mesaĝo restis same dum tiu tuta periodo, aŭ ĉu ĝi ŝanĝiĝis aŭ evoluis. Jen la ĉefaj paroloj:-

PETRO - 2:22-40	PAŬLO - 13:16-41
- 3:13-26	- 17:2-3
- 4:8-12	- 17:22-31
- 5:30-32	- 26:2-23
- 10:34-48	- 28:23-29

Atenta tralego de ĉiuj, tiuj paroloj konfirmas, ke preskaŭ ĉiuj el ili mencias preskaŭ ĉiujn el tiuj ses temoj: Jesuo, la krucumo, la releviĝo, la Mesio (Kristo aŭ juĝado aŭ regado), plenumo de profetaĵoj kaj bapto por pardono de pekoj.

Pluaj pli mallongaj paroloj troveblas:-

8:5,12 kaj 30-38; 18:5; 19:4-8; 20:20-21,25; 28:31.

Tiuj ne mencias ĉiujn ses temojn, sed ili ĉiuj parolas pri Jesuo kaj pri Kristo aŭ la Regno de Dio, kiun tiu titolo implikas. Tiel eblas esprimi la veran evangelion per la frazo en la lasta verso de La Agoj, nome

'LA REGNO DE DIO KAJ LA AFEROJ PRI LA SINJORO JESUO KRISTO'

Tio akordas kun la instruaĵo de Jesuo mem, kaj kun la plua instruado de la apostoloj en ties epistoloj, ekz. Rom.1:1-6.

Valoras rimarki kion tiuj paroloj **ne** mencias. Troviĝas nenio ajn pri la Triunuo, la Diablo, senmortaj animoj irante en la ĉielon, preĝoj al Maria, aŭ adoro de 'sanktuloj'

"KION NI FARU?"

Post tiu unua parolo de Petro je la Pentekosta tago, la homoj kriis "*Kion ni faru?*" (2:37) kaj Petro ordonis ilin ekpenti kaj baptiĝi '*en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj*' (v.38). Por konstati ĉu tio aplikis nur al tiu speciala okazo, aŭ al ĉiu okazo, kiam homoj ekkredas la evangelion, necesas rigardi la sekvantajn okazojn kiam la apostoloj predikis kaj konvertis iujn ajn.

4:4 - Judoj, aŭskultinte '*la vorton*' (alia mallongigo por la evangelio), '*kredis*'

8:12 - Samarianoj, '*kredis kaj baptiĝis, viroj kaj virinoj*'

8:36-39 - Etiopa eŭnuko kredis kaj baptiĝis '*en akvon*'

9:18 - Saŭlo (Paŭlo) baptiĝis

10:48 - Kornelio kun parencoj kaj intimaj amikoj baptiĝis, eĉ post ricevo de la Sankta Spirito

16:15 - Lidia kaj ŝia familio estis baptitaj

16:31-34 - la malliberejestro kaj liaj domanoj lernis kaj baptiĝis '*senprokraste*'

17:34 - Iuj Atenanoj kredis

18:8 - Krispo kaj multaj Korintanoj kredis kaj baptiĝis

19:5 - Efesanoj baptiĝis, eĉ kvankam ili jam baptiĝis en la bapton de Johano

El tiuj 10 ekzemploj, 8 priskribas la tujan bapton de la konvertitoj. Tio, kune kun la ekzemplo de Jesuo (Mt.3:13-16) kaj la ekspliko de Paŭlo pri la signifo de bapto (Rom.6:1-11) lasas nenian ajn dubo, ke bapto nepre necesas.

KION ILI FARIS POST BAPTIĜO?

La unua grupo de ĉirkaŭ 3000 animoj (personoj), kune kun la 120 disĉiploj kaj apostoloj, konsistigis la unuan eklezion (1:15, 2:41). Je la fino de la 2-a ĉapitro legeblas pri 4 aferoj, en kiuj ili '*persistis*' (v.42), kaj versoj 44-47 pli vaste klarigas ties signifon kaj praktikon.

1 - '*la instruo de la apostoloj*'

En unu el siaj unuaj leteroj, Paŭlo forte riproĉis la Galatojn, ke ili '*tiel rapide foriĝas for al malsama evangelio*' (1:6). Li eĉ dufoje diris '*se eĉ ni aŭ anĝelo el la ĉielo, al vi instruus evangelion krom tiu, kiun ni jam al vi instruis, tiu estu anatemita*' (v.7-9). Klare nepre necesas firme teni la veran evangelion.

Kvankam la evangelio ne ŝanĝiĝas, la ideoj de la kredantoj devis ŝanĝi por akcepti, ke ne nur al judoj Dio proponas savon. Post la konvertiĝo de iuj nacioj, iuj judaj kredantoj komencis instrui, ke tiuj nacioj devas observi la leĝon de Moseo (15:1-33). Tio estas doktrino, kiun la apostoloj ne instruis, kaj necesis forte kontraŭi ĝin ĉar ĝi tute subfosas la doktrinon de savo per fido. Okazis granda disputo, kiun la apostoloj klopodis solvi pere de kompromiso (v.20). Jesuo klare instruis, ke ne gravas kion ni manĝas (Mk.7:14-23), sed por helpi al la judaj kredantoj alkutimiĝi al la ideo, ke en Kristo ili devas unuiĝi kun la nacioj, la apostoloj ordonis, ke la ne-judoj evitu idoloferitaĵojn kaj sangon (v.29). Tio estas ekzemplo por eklezioj kiel pritrakti tiajn problemojn.

Bedaŭrinde, malgraŭ tiu klopodo, la problemo ne foriris. Ĉiam de tiu tempo eĉ ĝis nun, la eklezio suferis pro homoj, kiuj volas envenigi regulojn pri eksteraĵoj kiel manĝaĵo, festo-tagoj, ceremonioj,

specialaj vestoj kaj kutimoj. Preskaŭ ĉiuj el la epistoloj luktas kontraŭ tiu problemo, ekz. Rom.14, Gal.1-5, Efes.2, Filip.3, Kol.2, Heb.13. Paŭlo avertis *'eĉ inter vi mem leviĝos viroj perverse parolantaj por forlogi post si la disĉiplojn'* (Ag.20:30). Klare estas grave rezisti malpravan instruon.

2 - **'la kunuleco'**

La jenaj versoj montras la signifon de tiu esprimo en la unua eklezio:-

2:44-45 - *'ĉiuj kredantoj estis kune, kaj havis ĉion komuna ... ili vendis siajn havaĵojn kaj posedaĵojn kaj dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono.'*

4:32-37 - la kredantaro estis *'unukora kaj unuanima, kaj neniu diris, ke io el lia havaĵo estas propra al li.'*

6:1-6 - ili aranĝis subtenon por la vidvinoj

11:28-30 - la gefratoj en Antioĥia sendis helpon al tiuj en Judujo

20:35 - Paŭlo instruis ilin helpi la malfortulojn

24:17 - Paŭlo portis almozojn al la judaj eklezioj

La subtenado ne estis nur per mono. Gefratoj vizitis Paŭlon kiam li estis kaptito, por helpi lin (24:23), kaj li skribis en siaj leteroj, ke ili prizorgu unu alian, ekz. Rom.16:1, 1Kor.16:10, Kolos.4:10

3 - **'la dispecigo de pano'**

Ĉi tiun simplan riton la unua eklezio faris:-

2:46 - en siaj domoj *'kun ĝojo kaj unueco de koro.'*

20:7-11 - en la unua tago de la semajno.

La ordono de Jesuo fari tion estas klara (Mt.26:26-29, Mk.14:22-25, Lk.22:14-20), kaj Paŭlo konfirmis ĝian signifon kaj gravecon (1Kor.10:16-17, 11:23-29).

4 - **'preĝoj'**

Valoras legi pri la preĝoj, kiujn ni havas en ĉi tiu libro:-

4:23-31; 6:4; 8:15; 10:9, 30; 12:5,12; 13:3; 14:23; 16:16, 25; 20:5; 28:15.

Tiuj preĝoj estas simplaj kaj spontaneaj, laŭdante kaj dankante Dion, kaj petante helpon por resanigo kaj sukcesa predikado. En siaj leteroj, la Apostolo Paŭlo ĉiam preĝis por la gefratoj, kaj Jesuo ofte preĝis la tutan nokton. Ne eblas troigi la gravecon de preĝado, ĉar ĝi estas ne nur la parolo de kredanto al Dio, sed ankaŭ la okazo por Dio paroli al kredanto.

Estas notinde, ke en La Agoj troviĝas nenio pri pastroj, krucoj, ikonoj, altaroj aŭ ofte ripetitaj formalaj preĝoj. Oni povas kompari la diversajn nuntempajn ekleziojn kun tiu unua jarcenta eklezio, kiu:-

1 - Predikis pri la Regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo

2 - Insistis, ke bapto de kredantoj plenkreskuloj per tuta subakviĝo nepre necesas por savo

3 - Rezistis la aldonon de iuj aliaj instruoj aŭ kutimoj

4 - Montris amon unu al aliaj per volonta divido de ĉies havaĵoj laŭ bezono

5 - Dispecigis panon kaj trinkis vinon kune, ofte, memore de Jesuo

6 - Preĝis al Dio, dankante, laŭdante kaj petante helpon

Estas evidente ankaŭ, ke ĉiuj kredantoj allogis homojn kuniĝi kun ili per siaj predikado kaj ekzemplo, ĉar *'la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savotojn.'* (2:47)

